XXVII ORDINARA TEMPO – 5an de oktobro 2014

***LI LUIGOS LA VITEJON AL ALIAJ KULTIVISTOJ. – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM***

**El la evangelio laŭ Mateo 21, 33 43**

**En tiu tempo Jesuo diris al la ĉefpastro kaj pliaĝuloj de la popolo: «Aŭskultu alian parabolon. Iu plantis vitojn en sia kampo, kaj ĉirkaŭŝirmis ĝin per heĝo; li fosis por loki vinpremilon kaj konstruis gardoturon; poste li luigis ĝin al kultivistoj kaj forveturis.**

**Kiam venis la tempo de la rikolto, li sendis siajn servistojn por ricevi de la kamparanoj ĝiajn fruktojn. Sed la kultivistoj kaptis liajn servistojn, batis unu, mortigis alian, ŝtonbatis la trian. La domomastro sendis denove aliajn servistojn, pli multajn ol la unuaj; sed la kamparanoj faris al ili sammaniere. Fine li sendis sian filon, opiniante: "Ili respektos mian filon!".**

**Sed la kultivistoj, vidante la filon, diris inter si: "Tiu estos la hereda posedanto. Ni do mortigu lin kaj ni havos lian heredaĵon". Ili kaptis lin, elĵetis lin ekster la vitejon kaj mortigis lin. Kiam venos la sinjoro de la vitejo, kion li faros al tiuj kamparanoj?». La ĉeestantoj respondis: «Tiujn malbonulojn li senkompate pereigos kaj luigos la vitejon al aliaj kultivistoj, kiuj donos al li la fruktojn ĝustatempe».**

**Jesuo diris al ili: «Ĉu vi neniam legis en la Skriboj:**

**"La ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj, fariĝis bazangula ŝtono. La Sinjoro tion faris, kaj ĝi estas mirindaĵo antaŭ niaj okuloj"?**

**Pro tio Mi certigas vin, ke estos de vi forprenata la regno de Dio, kaj ĝi estos donata al nacio, kiu liveros ĝiajn fruktojn».**

La malamiko de Dio ne estas la peko. La pekanto kiu akceptas la amon de la Sinjoro povas konvertiĝi. La malamiko de Dio en la evangelioj nomiĝas profito. La profito igas sensentaj kaj malamikaj al la dia agado. Estas tio kion ni legas en la evangelio de Mateo, ĉapitro 21, versikloj 33-43.

Post eldirado al la plej altaj religiaj aŭtoritatuloj, al la ĉefpastroj kaj al la pliaĝuloj, ke la kategorioj de ili konsiderataj ekskluditaj de la dia agado, kiaj estis impostistoj kaj prostituitinoj, havos sian lokon en la regno de Dio, Jesuo sin adresas al la plej altaj aŭtoritatuloj, al la ĉefpastroj kaj al la pliaĝuloj, dirante: "*Aŭskultu*".

Ne temas pri invito, sed pri imperativo, pri ordono. "*Aŭskultu alian parabolon*". Tio estas la tria parabolo kiun Jesuo eldiras kaj kiu havas kiel protagoniston la vitkampon. La vitkampo estas la bildo de la popolo de Izraelo laŭ la bildo kiu troviĝas en la libro de profeto Jesaja je ĉapitro 5.

Fakte estas ĝuste la vitkampo la protagonisto de tiu ĉi parabolo. *Iu plantis vitojn en sia kampo,* kaj je tiu ĉi punkto la evangeliisto, per serio da vortoj, indikas la grandan zorgon de tiu persono por la vitkampo. *Li ĉirkaŭŝirmis ĝin per heĝo; li fosis por loki vinpremilon kaj konstruis gardoturon.* Li indikas do la grandan zorgon de la mastro por tiu vitkampo.

*Poste li luigis ĝin al kultivistoj kaj forveturis. Kiam venis la tempo de la rikolto,* … la utiligata vorto por esprimi la "tempon" signifas "la favoran tempon", la oportunan tempon, *li sendis siajn servistojn por ricevi de la kamparanoj ĝiajn fruktojn.*

La evangeliisto insistas pri la fakto ke la fruktoj estas de la mastro. *Sed la kultivistoj kaptis liajn servistojn, batis unu, mortigis alian, ŝtonbatis la trian.* Tio estas la sorto de la profetoj. Konstante Dio sendis profetojn al sia popolo kaj konstante tiuj profetoj estis rifuzataj, persekutataj kaj ofte mortigataj. Kial? La profetoj ekde ĉiam invitas al ŝanĝo, sed tiuj kiuj instaliĝis en la povo ne deziras ŝanĝi, sed gardi sian privilegion, sian prestiĝan pozicion.

*La domomastro sendis denove aliajn servistojn, pli multajn ol la unuaj; sed la kamparanoj faris al ili sammaniere. Fine li sendis sian filon.* La esprimo indikas ke temas pri la ununura filo, kiu estas tiu kiu reprezentas la patron, kiu heredas ĉion. O*piniante: "Ili respektos mian filon!".*

Kia iluzio! La religiaj aŭtoritatuloj respektas nur sin mem, sed ne respektas la aliajn, ĉar ĉio kion ili faras, kiel nun Jesuo denuncos, baziĝas sur propra oportuno kaj ne sur la bono de la aliaj.

*Sed la kultivistoj, vidante la filon,* la vorto filo aperas por la tria fojo, *diris inter si: "Tiu estos la hereda posedanto. Ni do mortigu lin kaj ni havos lian heredaĵon".* Jesuo senmaskigas la fakton ke la vera Dio de la templo nomiĝas profito, nomiĝas oportuno. Jesuo ne mortis ĉar tio estis la volo de Dio, sed li mortis pro la profito de la reganta pastra kasto.

La kalkulo do kiun tiuj kamparanoj faras, kiujn ni poste vidos esti la religiaj aŭtoritatuloj, baziĝas nur sur propra profito. Dum Jesuo, pro la bono de la homaro, oferis sian avantaĝon, la aŭtoritatuloj pro propra profito, oferas la bonon de la homaro kaj ne hezitas eĉ mortigi la filon de Dio.

*Ili kaptis lin, elĵetis lin ekster la vitejon kaj mortigis lin."* Esti elĵetitaj signifas, laŭ la libro de Levidoj, ĉapitro 24, versiklo 14, la kondamnon rezervitan por la blasfemantoj. La plej altaj religiaj aŭtoritatuloj de la popolo, opinias Jesuon, la filo de Dio, malamiko de Dio, blasfemanto. Kaj tiele li devas esti eliminata.

*Kiam do venos la mastro de la vitkampo, kion li faros al la kamparanoj?* Kaj la ĉefpastroj kaj la pliaĝuloj, al kiuj Jesuo adresis la parabolon, eldiras sian verdikton. "*Tiujn malbonlojn li mortigos mizere*". Por pli bone transdoni la grekan tekston oni devus traduki per "igos mizere morti tiujn mizerulojn", aŭ "tiujn malbonulojn li malbone pereigos".

Do ili mem eldiras sian verdikton. "*Kaj li luigos la vitkampon al aliaj kultivistoj*", al la paganaj popoloj, "*kiuj donos al li la fruktojn ĝustatempe".*

Kaj Jesuo tre ironie, ni ne forgesu ke li sin adresas al piuloj, la ĉefpastroj kaj la pliaĝuloj kiuj konas la Skribojn, kvazaŭ ili estus sensciuloj, diras, citante Psalmon 118: "*Ĉu vi neniam legis en la Skriboj: "La ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj, fariĝis bazangula ŝtono"*, la ŝtono malŝatata estis reale la plej grava ŝtono.

*La Sinjoro tion faris, kaj ĝi estas mirindaĵo antaŭ niaj okuloj"?* Kaj jen la verdikto de Jesuo: *Pro tio Mi certigas vin, ke estos de vi forprenata la regno de Dio.* Jesuo jam diris ke la kategorioj taksataj de la religio la plej foraj, kiaj prostituitinoj kaj impostistoj, antaŭeniris, ne en la movosenco sed en la senco preni lokon, nun Jesuo tion diras klare: *estos de vi forprenata la*

*regno de Dio kaj ĝi estos donata al nacio,* oni celas al pagana popolo*, kiu liveros ĝiajn fruktojn".*

Estas bedaŭrinde ke en la liturgia versio estis forprenata la versiklo 45 kiu estas tiu kiu komprenigas al kiu sin adresas tiu parabolo. "*Aŭskultinte liajn parabolojn, la ĉefpastroj kaj la fariseoj komprenis ke tiuj temis pri ili kaj klopodis lin kapti, sed ili timis la homamason kiu lin konsideris profeto".*

La vortoj de Jesuo ne vekas deziron je pento, la aŭtoritatuloj neniam pentas, sed nur la eliminon de tiu kiu ilin senmaskigis.